

# Eŭropa Bulteno

Oktobero 2012, Numero 120

## NOVA GRAVA FINANCA SUKCESO DE EEU



Kiel konate, pro la profesia laboro de nia direktorino Maja Tiŝljar, Eŭropa Esperanto-Unio ĉiam pli regule estas financata el la mono de Eŭropa Komisiono, ĉefe per apartaj projektoj. Nur unufoje ni ricevis efektive ankaŭ subvencion por la funkciado de la asocio mem sed nun jam la 3-an fojon unu el la projektoj ellaboritaj de Maja, ĉi foje kunlabore kun la partnero E@I, estis aprobita kaj ni devos realigi ĝin inter decembro 2012 kaj novembro 2014. Temas pri projekto LINGVO.INFO pri kiu detalojn vi povas legi en la ĉi-numera artikolo de Petro Balaŝ. Ĝi estos realigita per la helpo de euntute 9 partneraj organizoj kaj ĝia kompleta valoro estas 530.000 eŭroj el kio EU pagos 400.000. La kompletan kunordigadon transprenis EEU kaj la gvidan rolon havos Maja Tiŝljar. La subvencio unuflanke multe helpas la profesion agadon de EEU ĉar ĝi ebligas ke EEU pagu salajron por partatempa laboro al Maja, kiu ja pro ĝi havos grandegan laboron, sed ŝi kompreneble plu agos ankaŭ kiel direktorino de EEU ĝenerale. Aliflanke EEU ricevas same kiel la aliaj 8 partneroj 75% de sia parto de la buĝeto kaj devas mem havigi 25% de sia propra projektbuĝeto, kio estas sumo multe pli alta ol la realaj jaraj enspezoj de EEU, sed ni fidus ke kun helpo de esperantistoj ni sukcesos majstri ambau defiojn: realigi bonegajn projektrezultojn kaj trovi rimedojn por finance realigi la projekton laŭplane.

Zlatko Tiŝljar

## NIAJ LANDAJ ASOCIOJ ESPERANTO EN LUKSEMBURGIO


Pri la frua historio de Esperanto en Luksemburgio ni scias nur, ke en 30aj jaroj la germano Wilhelm Solzbacher (kiu poste aktivis dum jardekoj en Usono) estis delegito en urbo Luksemburgo. Tio estas kampo ankoraŭ priesplorinda. Dum multaj jaroj Ido estis certe pli konata en Luksemburgio ol Esperanto pro la laboro de la instruisto Henri Meier (1888-1973) el Esch-sur-Alzette, kiu organizis internacian Ido-kongreson en Luksemburgo en 1924.

La nunan asocion, "Luksemburga Esperanto-Asocio", koncize LEA, fondis malgranda grupo de idealistoj la 26an de novembro 1971 je la horo 20:30. Post tiu fondiĝo jam en 1972 unu el la grupanoj, s-ro Emile Pleim, kuraĝis gvidi kurson al 15 junaj geinteresuloj. El tiu kurso pluraj personoj engaĝiĝis movade kaj baldaŭ LEA konsistis el deko da aktivuloj kaj 120 honoraj membroj. Jen la unua komitato: Marcel Ries - prezidanto, Robert Hoegener – vizprezidanto, Emile Pleim – sekretario, Beby Hopp – kasistino, Raymond Huberty kaj la idisto Henri Meier – membroj. En 1972 Marcel Ries tre verve reprezentis la novan luksemburgan movadon ĉe fervojista kongreso en Clervaux. Jam jaron poste en 1973 LEA okazigis "Eŭropan kongreson" kun pli ol 500 partoprenantoj el 20 landoj. En la preĝejo de Bonnevoie estis celebrita tiumomente la unua Esperanto-geedziĝo en nia lando. Sekvis du jarojn poste unua junulara aranĝo en la tiama "Maison de l'Europe" en Pfaffenthal helpe kun Hans-Dieter Platz el Germanio. Dum la sekvantaj jaroj la asocia kaj esperantista vivo rapide evoluis kaj en 1977 Albert Wickler - dua prezidanto de LEA - organizis ILEI-konferencon sur Kirchberg. Tiutempe ankaŭ pastro Hansjörg Kindler kun granda entuziasmo membriĝis al la luksemburga grupo kaj ekde tiam tre forte influis la asocian vivon. Menciindas kelkaj gravaj eventoj: 38-a IKUE kongreso en 1979, regulaj kursoj, bela poŝta stampo ESPERANTO, semajna rubriko en la plej grava gazeto 'Luxemburger Wort', Esperanto-Centro ĉe 'Place des Bains', luksemburga stando ĉe la UK en Ateno, prospekto pri Luksemburgio 'la verda koro de Eŭropo', Eŭropa Kalendaro, organizado de Esperanto-kursoj en la somera arternejo 'Summerakademie' kaj kaj kaj...



En la jaro 1980 Brian Moon elektiĝis prezidanto de LEA, kaj ĝis la hodiaŭa tago li gvidas la asocion. Aranĝoj kiel partopreno en 'Fête des Langues', diversaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj, ĉiumarda kunveno kaj ĉiumonata prelego kun diversaj temoj karakterizas la nunan programon de la asocio. Dank al kara forpasinta membro Ger Schlechter (mem regule radioaktiva dum longa tempo ĉe RTL) LEA disponas pri ege

taŭga kunvenejo en kvartalo Limpertsberg en la ĉefurbo Luksemburgo. La asocio momente havas ĉ. 20 aktivajn membrojn kaj ĉ. 80 pli malpli aktivajn. Dum pli ol 40 jaroj de ekzisto de la asocio almenaŭ 360 personoj eklernis la internacian lingvon.



Ĉefa menciinda afero de lastaj jaroj estas la aperigo en 2009 de luksemburglingva versio de la kurslibro ‘Esperanto per rekta metodo’ de Stano Marček. Tio estis absolute la unua fojo, kiam eldoniĝis libro, per kiu eblas lerni alian lingvon sur bazo de la luksemburga, kaj tiun unuafojecon ni klopodis ekspluati. Intertempe aperis aliaj luksemburglingvaj materialoj por lerneja lernado de la franca, sed nia lernolibro pri Esperanto restas

iel unika. Tamen necesas agnoski la problemon, ke pro la demografia dinamiko de lastaj jardekoj, kun konstante abunda enmigrado, granda parto de nia publiko ne estas vere luksemburglingva.

Rilate al tiu konstanta enmigrado, kiu forte karakterizas la socian evoluon en Luksemburgio dum lastaj jaroj, necesas menci i ankaŭ la fenomenon de almigrado de esperantistoj. Diversaj institucioj de Eŭropa Unio havas sian sidejon aŭ sian filion en Luksemburgo kaj montriĝis, ke inter la oficistoj de EU troviĝas jen kaj jen esperantisto – plej ofte, sed ne nur, en la tradukservoj. Tiel ekzistas eta paralela Esperantujo kun rondo de EU-oficistoj, kiuj regule sed neformale renkontiĝas, tamen ne same regule kontribuas al la vivo de la loka asocio. Nia ĉefa problemo estas gardi la homojn por aktive partopreni aŭ aktive subteni nian movadon. Junaj homoj raras pli kaj pli. La lingva situacio en Luksemburgio estas tre speciala: la lando estas unike trilingva, kio povus konduki al bona konscio pri la avantaĝoj de multlingveco kaj respekto de lingvaj rajtoj, sed en praktiko rezultas, ke homoj facilanime akceptas la superregan aldonon de plia lingvo, la angla.

Brian Moon kaj Albert Wickler

## 125 JAROJ DE ESPERANTO CELEBRITA EN POLA SENATEJO



Okaze de 125-a jubileo de Esperanto kaj de Eŭropa Tago de Lingvoj flanke de Eŭropo-Demokratio-Esperanto - PL estis organizita konferenco en Pola Senatejo kun altnivela ekspozicio. Ses EDE-anoj jam pli frue venis al Varsovio por pretigi la ekspozicion, kiun finance subtenis mecenato Etsuo Miyoshi, kiu tagon antaŭ la aranĝo estis feste akceptita kiel Honora Membro de EDE-PL. La enmanigo de la agnosko okazis en la sidejo de PEA.

La 17-an de oktobro okazis inaŭguro de Parlamenta-Senata Grupo por promocio de Esperanto, kiun gvidis prof. Edmund Wittbrodt. Al la grupo aliĝis jam 13 personoj. Sekve okazis inaŭguro de porokaza jubilea ekspozicio, kiun malfermis

vicmarŝalo Jan Wyrowinski. Plue salutis: vicprezidantino de la Senato Wanda Nowicka, vicmarŝalo de la Sejmo Maria Pancyk-Pozdziej, prezidanto de EDE-PL Antonio Walaszek kaj profesoro Wittbrodt.



La ekspozicio estis ankaŭ vizitita de reprezentantoj de la Japana Ambasadorejo en Varsovio.

Tra la ekspozicio gvidis vicprezidanto de EDE-PL Edward Kozyra kaj la tuton filmis televido el Malbork. Estis prezentitaj eĉ originalaj korespondadoj de L.L. Zamenhof.

La konferencon malfermis vicprezidanto de Pola Senato Jan Wyrowinski kaj tra la konferenco gvidis Malgorzata Komarnicka. Ĉar doktoro Sean O'Riain - prezidanto de EEU - ne povis veni, lia prelego estis tralegita de Alina Mozer. Poste parolis Etsuo Miyoshi, Kazimierz Krzyzak kaj profesoro Stepniewski. En la diskuto partoprenis interalie Prof.



Iwinski, Andrzej Grzebowski, Roman Dobrzynski, Stanislaw Rynduch, Andrzej Moroz, Barbara Kulpinska....

La diskutadon prof. Wittbrodt pritaksis kiel sincera kaj tre bona kaj promesis baldaŭan konstituiĝon de la parlamenta laborgrupo. Etsuo Miyoshi invitis la politikistojn kaj kelkajn esperantistojn al festa vespermanĝo por pli detale preparoli venontajn paŝojn.

La aranĝo laŭ multaj eldiroj estis ege sukcesa kaj altnivela donante bonan esperon.

Stanislavo Rynduch - vicprezidanto de EDE-PL

## **E@I KUN TRI NOVAJ EDUKAJ EU-PROJEKTOJ FINANCATAJ DE EU**



Tiu ĉi jaro estis denove fruktodona por E@I rilate al novaj EU-projektoj. De ses senditaj monpetoj, en kiuj E@I estis envolvita, tri el ili estis aprobitaj. En ĉiuj tri estos E@I „nur“ partnero, t. e. ke ĝi ne kunordigos la

projektojn, sed partoprenos en ili kiel unu el partneroj. Tio ankaŭ havas siajn avantaĝojn – ĝuste kunordigado estas kutime plej burokrata kaj temporaba afero pri la projektoj dum kiel partnero eblas plene koncentriĝi al la praktikaj laboroj.

Pri kio temos en la projektoj?

**1. lingvo.info** - La unua efektive temas pri dekomanca reconstruo de la projekto „Lingva prismo“ - retejo [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info) – kiun E@I kreis (kunlabore kun kelkaj organizoj) jam en la jaro 2003. La paĝaro celas per interesa, amuza formo prezenti diversajn lingvojn de la mondo, lingvan diversecon kaj prilingvajn temojn (lingva ekologio, ekonomio, lingva politiko ktp.). La projekto jam dum pluraj jaroj ne estis aktualigata (ĉefe pro manko de financoj kaj homfortoj), tial ni ĉi-jare provis monpeti por kompleta reconstruo de la retejo, kun la plano prepari amason de nova enhavo, riĉigi tradukojn (al plejmultaj EU-lingvoj), krei lingvo-ludojn ktp. Por la projekto efektive sukcese monpetis EEU – kaj ĝi do estos ankaŭ la kunordiganto de la projekto. La proektideon komune ellaboris EEU, E@I kaj Studio Gaus el Germanio: EEU kiel kunordiganto kaj verkanto de la ampleksa monpeto kaj E@I kaj Studio Gaus kiel antaŭaj kreintoj de la paĝaro kies ideo estis la nova projekto. Aldone, en 7 el 9 en la projekto partoprenantaj organizoj rekte estas envolvitaj Esperantistoj! Do la projekto estos preskaŭ pure peresperanta. Kunlaboro de EEU kun E@I (kun grava helpo de ceteraj partneroj) povas trafe kontribui al plua konkreta helpo al malgrandaj kaj minoritataj lingvoj far E-movado kaj nerekte varbado por Esperanto. La retejo povos prezenti praktikan pruvon, ke Esperantistoj ja subtenas lingvan diversecon kaj pretas por ĝi ion tre konkretan fari. Samtempe en ĝi inter informoj pri aliaj lingvoj troveblas ankaŭ informoj pri Esperanto kaj la paĝaro estos preparita en 17 lingvoj, inter kiuj kompreneble ankaŭ Esperanto.

**2. Global E-learning** – estas projekto kun la celo krei portalon - multlingvan, multmedian kurson pri tutmondaj temoj (angla esprimo „global education“). Do ĉefe temos pri ekologio, sed la ĉefa trajto estas konsciiĝi homojn, kiel unuopaj aferoj en la nuna tutmondiĝanta epoko interrilatas. Certe do eniros ankaŭ la temo de lingva ekologio ene de la temaro. E@I planas ankaŭ realigi E-version de la paĝaro. En la projekto 2 el 4 partneraj organizoj estas E-aj.

**3. Speak and Learn** – estos poŝtelefona (kaj tabulkomputila) aplikaĵo, ebliganta lerni bazajn esprimojn kaj frazojn en diversaj EU-lingvoj. Planata estas plurplatforma aplikaĵo, kiu funkcios en ĉiuj nunaj operaciumaj sistemoj /Android, iOS, Windows 8/. Same ĉi tie E@I planas aldoni Esperanton inter la elekteblaj lingvoj.

**deutsch** info

Krom la novaj EU-projektoj, kiuj komenciĝas en tiu-ĉi tempo, E@I estas nun realiganta gravan lingvan retejon

[www.deutsch.info](http://www.deutsch.info). La celo de la projekto estas krei senpagan retpaĝon por lernado de la germana, enhavanta ankaŭ informojn pri la vivo en Germanio kaj



Aŭstrio. Estas planataj kursoj de la germana por la niveloj A1, A2 kaj B1, la kerno de la nivelo B1 estos precipe situacioj gravaj por enmigrantoj. Krom tio en la retejo troveblas informoj pri Germanio kaj Aŭstrio kaj pri iliaj kulturoj, tamen precipe troviĝos tie utilaj praktikaj informoj kaj konsiloj rilatantaj al restado kaj laborado en ambaŭ landoj. Kompreneble ni planas la retejon traduki krom aliaj 9 lingvoj ankaŭ al Esperanto.



Cetere – ankaŭ la pasintjare realigita EU-projekto „Slovak Online“ - [www.slovake.eu](http://www.slovake.eu) bone fartas. Registriĝis jam pli ol 5000 uzantoj el 170 landoj! La retejon vizitis jam pli ol 200.000 unuopaj personoj, ĉiutage vizitas la paĝaron pli ol 1000 homoj. La retejo jam funkcas en 8 lingvoj (inkluzive Eon). Aldone - la retejo [www.slovake.eu](http://www.slovake.eu) estis ĉi-jare de Eŭropa Komisiono elektita inter la plej bonaj projektoj (t.n. „best practise projects“). Ankaŭ tio pruvas, ke la laboro de E@I iĝas pli ofte rimarkata ankaŭ de „ekstera“ mondo.

Ankaŭ en 2013 E@I volus lanĉi kelkajn novajn EU-projektojn. En nuna tempo ekas jam detala pripensado de iliaj celo kaj enhavo. Espereble ankaŭ ili kontribuos al pli ofta videbligo de Esperanto en la /ne nur reta/ mondo.

Peter Baláž, E@I-kunordiganto

## KAEST 2012 PROKSIMIĜAS

Dua ĉi-jara internacia aranĝo de E@I (post SES 2012) okazos novembre. La plej proksima KAEST – “Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko” – okazos de la 15-a ĝis la 18-a de novembro 2012 en Modra-Harmónia, Slovakio.

La ĉi-jara ĉeftemo estas: “Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj”, tamen estos spaco ankaŭ por alitemaj prelegoj paralele.

La programo de KAEST konsistos el kelkaj partoj:

- prelegoj (en du paralelaj blokoj – ĉeftemaj kaj alitemaj)
- trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj ks.)
- fakaj diskutoj (pri certa temo)
- vespera (neformala) programo (vingustumado, filmoprezento, diskutoj ks.)
- ekskurso al kastelo Červený Kameň (laŭ interkonsento kaj mendo)



Ni kore invitas ĉiujn veni kaj ĝui prelegojn, prezentojn, diskuti pri scienco kaj tekniko, praktike ekzerci kaj utiligi novakiritajn sciojn. Kompreneble, ni kun ĝojo bonvenigos viajn kontribuojn, prelegojn pri via fako, scienco. Se vi interesiĝas prelegi dum la aranĝo, menciuiton en via aliĝilo kaj la organizantoj kontaktos vin.

Antaŭ la aranĝo samloke okazos ankaŭ kunsido de ILEI-estraro. Dum KAEST do ankaŭ la ILEI-estraranoj riĉigos la programon per siaj prezentoj/prelegoj.

Aldone: la 15-an vespere kaj la 16-an antaŭtagmeze okazos speciala trejnado pri Vikipedio – kunlabore kun freŝe ĉi-jare fondita organizo “Wikimedia Slovenská republika”, en kiu estas envolvitaj ankaŭ E-istoj (efektive nuna prezidanto de SKEJ – Michal Matúšov iĝis ankaŭ prezidanto de la slovakaj Vikimedio!). Por la trejnado finance kontribuis ankaŭ Wikimedia Foundation.

**Venu ankaŭ vi ĝui sciencon en Esperanto.** Atendas vin abunda kaj interesa programo!

Detaloj pri la aranĝo: <http://kaest.ikso.net>

Peter Baláž – kunorganizanto

## ARTLIBRO PRI ARKITEKTURO EN ESPERANTO

La tradukentrepreno **LinguaForce** lingve helpis la germanan arkitektur-studion Kuehn-Malvezzi por la ekspozicio “*Komuna Fundamento*” prezentata okaze de la 13-a internacia ekspozicio pri arkitekturo “*Common Ground*”, kiu okazas kadre de Venecia Bienalo ĝis la 25a de novembro 2012.



LinguaForce, tradukagentejo ekde 2005 en la urbo Rennes (Francio), ĵus realigis imponan tradukon al Esperanto por la ekspozicio “*Komuna Fundamento*” kadre de la Venecia Bienalo. Tiuokaze, la arkitektura studio Kuehn Malvezzi kreis, kunlabore kun Double Standards, tion kio verŝajne estas la unua artlibro en Esperanto pri arkitekturo. “*Komuna Fundamento*” estas esperantigo de “*Common Ground*”, la nomo de la ĝenerala ekspozicio. Samokaze, libro samnoma estis eldonita tute en

Esperanto. La eldonisto estas Mousse Publishing ([Komuna Fundamento, 33 €, ISBN 978-88-6749-027-1](#), la libro estas akompanata de libreto kun la angla versio).

LINGUA FORCE

## NOVAJ OKAZOJ POR SERIOZE REPRESENTI ESPERANTON EN EŬROPO

EEU-representantoj en la Civilsocia Platformo por Multlingvismo, starigita de la Eŭropa Komisiono en 2009, daŭre havas eblecon aktivigi por pli efika lingvolernado, aparte por malpli fortaj studentoj, kaj proponi rolon por Esperanto tie. Fakte neniu kontraŭis tion laŭ mia ĝisnuna sperto, kaj pli kaj pli ni estas invitataj far ne-esperantistaj organizaĵoj kontribui al diskutoj kiujn ili organizas. Ekzemple Jozef Reinart kaj mi kontribuis en septembro al granda konferenco pri multlingvismo en Kipro, kie ni povis altiri atenton al la nova libro de Kostas Kiriakos en la greka lingvo pri Esperanto (“125 hronia, 1887-2012”), eĉ la atenton de la kipra komisionanino Androulla Vassiliou. Multaj gejunuloj mem prenis nian informmaterialon pri Esperanto (en la greka kaj la angla). Meze de novembro la Civilsocia Platformo invitis min esti panelisto dum 2-taga konferenco en Parma. Do, iom post iom moviĝas la antaŭeniĝo. Detalaj informoj pri la konferenco en Kipro troveblas fine de la Bulteno en la artikolo de Jozef Reinart.

Seán Ó Riain

## ERA KLOPODAS SUBTENI INICIATON PRI EŬROPA DIMENSIO DE LA SPORTOJ

Esperanto Radikala Asocio ekde 2008 batalas por eŭropa dimensio ankaŭ en sportoj kun propono ke unuopaj Landoj de la Unio partoprenu la internaciajn konkursojn donante videblon al la komuna eŭropa patrio. Post kiam ni sukcesis enmetigi tiun proponon en la Rezolucion de la Eŭropa Parlamento fare de la deputito Fisas, ni revenis denove al la itala fronto petante kune kun la deputito Beltrandi renkontiĝon al la Ministro Gnudi la 15an de februaro 2012. Ekde la unuaj tagoj de marto la Rezolucio estas je la atento de la italaj institucioj komencante de la Kultura Komisiono en kiu ĝi nun kuŝas.


Intertempe la Londonaj Olimpikoj okazis kaj ĉi tio povis esti la unua granda okazo por konkuri la landojn de la Unio kun la propra kaj la komuna eŭropa flago. Tiel bedaŭrinde ne estis, sed ni decidis vidigi en la reto ĉiutage kiaj estus la Olimpikoj 2012 se la 27 landoj de la Unio, kiuj reprezentas proksimume duonmiliardon da eŭropcivitanoj, konkuris kun la duobla flago, donante voĉon al la eŭropa dimensio de la sporto, kiun la fiavaraj naciaj politikoj ne volas. Montriĝis fine de la Olimpikoj ke sumante ĉiujn medalojn de la 27 EU-landoj. Eŭropa Unio superus Usonon preskaŭ trioble ricevinte entute preskaŭ unu trionon de ĉiuj olimpikaj medaloj.

Ni pluagos por atingi estonte tiun celon: landoj de EU en internaciaj sportaj aranĝoj prezentu apud sia flago ankaŭ tiun de EU. En la internacia sporto certe ankaŭ Esperanto devus trovi sian rolon.

Esperanto Radikala Asocio

## FESTU NOVJARON EN XANTEN

Kutime al la Novjara Renkontiĝo organizata de Esperanto-Land venas inter 150 kaj 200 partoprenantoj el deko da landoj aŭ pli, inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj, sed ankaŭ junaj plenkreskuloj, mezaĝaj kaj pli aĝaj partoprenantoj. Bela kuneco de la generacioj kun tre diversaj programeroj, tuta semajno da internacia etoso kaj komuna festado.



Ĉi-foje ni kunvenos en Xanten, urbo kun romia historio, proksime al Nederlando kaj Belgio - do ideala por internacia kunveno, kiu okazos de la 27-a de decembro 2012 ĝis la 3-a de januaro 2013. Ĝis nun aliĝis sesdeko da homoj, du trionoj de ili el ekster Germanio, triono infanoj kaj junuloj ĝis 20 jaroj.

Estos diversaj prelegoj kaj kursoj, lingvokursoj por pluraj niveloj, ekskurso al la urbo Xanten kaj ties historia parko pri romia historio, granda oferto



de laborgrupoj por infanoj kaj kompreneble vesperaj programeroj kiel silvestra festo, (pup)teatraĵo, pluraj koncertoj (JoMo, Tone kaj Patrick de la grupo Dolĉamar), ludoj, muzika kaj internacia vespero. Jen la pasintjaraj programeroj kiel ekzemplo, [http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#programeroj\\_anoncitaj](http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#programeroj_anoncitaj).

Ĉu ankaŭ vi ŝatus kunfesti? Eble ĵetu rigardon al la jamaj aliĝintoj ĉe [http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj\\_nr11.php](http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr11.php) kaj tiam: Ek al la aliĝformularo ĉe <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo>.

Lu Wunsch-Rolshoven

## TRE INTERESA RETEJO PRI ĈIUJ EBLAJ SERVOJ POR ESPERANTISTOJ

Eble vi ŝatas prezenti al viaj kursanoj eblecojn por apliki Esperanton post la kurso. Preskaŭ cent proponoj por kunfari troveblas en <http://per.esocom.de>. La enskribintoj estus dankaj, se vi informus pri [per.esocom.de](http://per.esocom.de) buŝe kaj en viaj retejoj.

Frank Merla

## LA JARO DE TIBOR SEKELJ

### 1. AGADO EN ĈINIO

Pasintjare mi legis en ESPERANTO artikolon pri Tibor Sekelj kaj tuj ĉinigis la tekston kun la ideo, ke mi faru tion, kion Zlatko iniciatis (indus pli detale esplori la vivon de Tibor Sekelj kaj aperigi libron pri tio). Ja mi ekpreparis prelegon kun la temo: Konigo de Tibor Sekelj kaj lia verko „Mondo de travivaĵoj“. Ĉar jam de kelkaj jaroj antaŭe mi eklegis la libron kaj fascinis min la priskribado de nia "mondvojaĝanto" oni aranĝis, ke mi parolu en oktobro 2012 kadre de serio da prelegoj al la publiko, aranĝita de Pekina Esperanto-Asocio.



Preparante min por la prelego, mi trovis min droni en la mondo de Tibor, ne nur tiu priskribita sed ankaŭ en la animo de la Esperantisto, kiu penetris en forajn landojn por amike proksimigi homojn de diversaj lokoj kaj valorigi ĉies ekziston. Do kiam mi faris la prelegon la 14-an de oktobro en Pekina Zhongguancun Librodomego mi jam ŝanĝis la prelegan temon al: Vojaĝo senfina, vojaĝanto senlandlima. Mia prelego sukcesis, prezentinte la karieron, sep librojn, elstarajn atingojn de la elstara persono. Iu eldonisto venis kaj proponis, ke mi plu laboru ke la nomo de Tibor Sekelj estu konata en Ĉinio! Li helpas min en eldonado de rilataj libroj kaj verkaĵoj! Se tio realiĝos, estos granda bonaĵo ankaŭ por nia kara lingvo Esperanto!

Kvankam baldaŭ ĉesos la jaro 2012, la jaro de Tibor Sekelj, tamen tio ne ĝenas, ke mia

laboro ĉi-rilate ĵus komenciĝis. Memore al la meritoplena figuro de Esperantujo kaj granda animo de kultura mondo, estas nia glora tasko daŭrigi nian "vojaĝon" niamaniere jaron post jaro. Ĉu ne?


Yu Jianchao

(Yu Jianchao laboras en Ĉina Radio Internacia, eksa estrino de ties Esperanto-Redakcio)

## ARTIKOLO DE LA SEMAJNO

En tria semajno de oktobro esperantaj vikipediistoj proklamis la artikolon pri Tibor Sekelj en E-vikipedio artikolo de la semajno. Tio estas grava agnosko ĉefe al Arno Lagrange kiu multe laboris por ĝin fari tiel ampleksa kaj kompleta. Ĝi estas la plej ampleksa kaj informplena artikolo inter ĉiuj nun troviĝantaj vikipedioj kaj oni povas konsideri ĝin kiel fontartikolo por retradukoj al aliaj (nacilingvaj) vikipedioj. Relative kontentige ampleksaj krom la esperanta estas tiu en la angla, franca, slovena kaj kroata kiuj estis faritaj laŭ la esperanta. Ekzistas entute artikolo pri Tibor Sekelj en 29 lingvoj, sed aliaj estas multe malpli ampleksaj. Mi invitas ĉiujn e-ajn vikipediistojn, sed ankaŭ aliajn bonvolulojn traduki almenaŭ la tekstan parton de la E-a vikipedio kaj enmeti ĝin en sialingvan vikipedion, se tia ne ekzistas aŭ anstataŭ la ĝisnunan per via pli ampleksa kaj kompleta. Se vi ne estas vikipediisto, turnu vin al Arno kaj li konsilos kiel teknike tion aranĝi.

### Evoluo de la artikolo en vikipedio:



#### Analizo:

- ĝis 2005 estis 3 etaj artikoloj (eo cs en) <= 1kb
- dum 2005 kreskis la Esperanta artikolo (al 10kb)
- ĝis 2008 aperis 5 aliaj (es fr hu ru sr)
- ĝis 2008 kreskis es fr (al 8kb)
- en 2009 aperis 14 aliaj lingvoj
- en 2009 kreskis cs hu sr (3-6 kb) kaj aparte forte en (10kb) ru (14kb)

- en 2009 malkreskis la ĉina (forigo de netradukita materialo)
- de 2009 aperis 6 novaj lingvoj nl be sk sl pl hr
- kresketas kelkaj (plej forte la baza angla)
- en 2011 kreskegis la Esperanta (al 115kb) kiu estas fonto de la slovena kaj de la kroata
- en 2012 forte kreskis en fr

Jen la artikolo kiun vi traduku: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor\\_Sekelj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj)

Kaj jen la adreso de Arno:

arno.raymond.lagrange(ĉe)gmail.com (kiam vi uzos ĝin, anstataŭigu (ĉe) per @).

Zlatko Tišljar

## ESPERANTISTAJ ARANĜOJ OKAZE DE EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

En la oficiala paĝaro de Konsilio de Eŭropo, kiu estas dediĉita al eventoj dediĉitaj al Europa Tago de Lingvoj. Ĉi-jare estis anoncitaj 610 eventoj entute inter kiuj 15 rilatis al Esperanto. Temis pri diversaj aranĝoj okazigitaj dum aŭ ĉirkaŭ la Tago (26. de septembro) en 8 landoj kaj unu en la reto. Plej multaj aranĝoj okazis en Francio, sed la Tagon oni pricelebris ankaŭ en Germanio, Nederlando, Danlando, Slovakio, Slovenio, Pollando, kaj Aŭstrio.

La tuta listo estas videbla ĉe la jena paĝaro:

<http://edl.ecml.at/Events/EventsDatabase/tabid/1772/language/sl-SI/Default.aspx>

Zlatko Tišljar

## EŬROPA KOMISIONO TAKSIS LA 10-JARAN SUBTENADON AL MULTLINGVISMO EN EŬROPO

Okaze de "Eŭropa Tago de Lingvoj" (la 26-a de septembro) kaj la 10-a datreveno de la rekomendoj de la Eŭropa Konsilio en Barcelono en 2002, ke ĉiu EU-civitano krom sia denaska ligvo parolu almenaŭ du fremdajn lingvojn (1+2), Eŭropa Komisiono (EK) organizis en Limasol ekde la 26-a ĝis la 28-a de septembro 2012 grandan lingvan konferencon pri la temo "Plurlingvismo en Eŭropo." La konferencon partoprenis Androulla Vassiliou, EU Komisionanino pri edukado, kulturo, multlingveco kaj junularo, kaj Mikaelo Anĝelo Martínez, Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento (EP) por multlingvismo.

La celo de la konferenco estis taksi la 10-jaran klopodadon por antaŭenigo de multlingveco, indiki kiel per novaj kaj novigaj formoj plibonigi lingvoinstruadon, plivastigi multlingvismon, doni respekton al ĉiuj lingvoj kaj kulturoj en EU kaj inkluzivigi temojn prilingvaj kaj prikulturajn inter la plej altaj politikaj prioritatoj, kiuj devintus plibonigi lingvan kaj kulturen interkompreniĝon de EU-civitanoj, engaĝi ilin en la procezon de eŭropa integriĝo por enpraktikigi la sloganon de EU "unuigitaj en diverseco".

Dum la konferenco partoprenantoj diskutis jenajn temojn: 1) multlingveco en „Eŭropo 2020“ kaj preparatan programon „Erasmus por ĉiuj“, 2) lingvaj servoj kaj industrioj en la

tutmondiĝanta mondo, 3) rezultoj de la eŭropa enketo pri lingva kapableco kaj ĉefaj datumoj pri instruado de lingvoj en lernejoj en Eŭropo en la eduka programo „Euridice“, 4) rezultoj de la Eurobarometro 2012 "Plurlingvismo en Eŭropo", 5) graveco de lingvoj en la nuntempo. EK preparos konkludojn de la konferenco kaj rekomendojn, kiujn ĝi prezentos al membrolandoj por diskuto kaj enigo en siajn naciajn laborplanojn kun celo atingi plibonigon de instruado kaj scipovo de lingvoj.

La konferenco plene pruvis la daŭran kontraŭdiron kaj paradokson en la ĝisnuna lingvopolitiko en EU. Je unu flanko, laŭ la komenca EU leĝaro kaj la direktivo n-ro 1/1958, ĉiuj oficialaj lingvoj de membroŝtatoj estas egalrajtaj. Je la alia flanko, en praktiko, en EU estas aplikata libermerkata lingvopolitiko, kiu klasifikas lingvojn laŭ grandeco de lando, ĝia ekonomia kaj politika influo, nombro da parolantoj, laŭ kiuj la angla estas la plej vaste uzata lingvo en internacia komunikado en EU, ne nur en EU-institucioj, sed ankaŭ je aliaj niveloj de komunikado.

Kun tia evoluo EU-membroŝtatoj ne estis kontentaj jam en 2002. Politikaj gvidantoj de membroŝtatoj dum la pintkunveno de la Eŭropa Konsilio en Barcelono rekomendis al civitanoj lerni pliajn lingvojn, por esti plurlingvaj, ke ĉiu civitano regu krom sia gepatra lingvo almenaŭ du fremdajn lingvojn. Ili rifuzis, ke en EU estus domina unu nacia lingvo, t. e. la angla. Rezultoj de la lastaj 10 jaroj de klopodado antaŭenigi multlingvismon restis nur en formo de rekomendoj al membroŝtatoj sen bezonataj politikaj kaj ekonomiaj instrumentoj, ĉar tereno de edukado, lingvoj kaj kulturoj restis je nacia nivelo, en kompetento de unuopaj membroŝtatoj. La prezentitaj rezultoj de enketo inter civitanoj surbaze de memtaksado de lingvoscipovo far Eurobarometro 2012 pri multlingvismo en Eŭropo kaj ĝia komparo kun la sama en 2005, montris ke la situacio pri la scipovo malboniĝis je 1% ĝis 3% (en ĉiu demando pri scipovo de 1, 2, 3, aŭ neniu lingvo). Multlingvismo ne disvastiĝis, sed anstataŭ tio grandaj lingvoj plifortigis siajn poziciojn en EU. Partoprenantoj de la unuopaj kunsidoj ne sciis respondon al demandoj: kiel motivigi homojn lerni lingvojn, fari lernadon de lingvoj pli sukcesa, pli rapida kaj samtempe plivastigi multlingvismon, kiel ŝanĝi la negativan tendencon kiu montras daŭran plifortiĝantan pozicion de la angla aŭ 3 lingvoj (angla, franca kaj germana).

Fine de la konferenco, la partoprenantoj diskutis pri la evoluo de lingvoj uzataj en internacia komunikado tielnomataj "lingua franca" en Eŭropo kaj la mondo, kiel estis la latina (neŭtrala lingvo), poste estis la franca, kaj nun estas la angla. Ili konscias, ke la angla ankoraŭ iom da tempo plenumos tiun taskon, sed oni ja scias, ke unu lingvo en EU jam ne sufiĉas. Al la demando, kiu lingvo plenumos en la tutmondiĝanta mondo tiun rolon en longdaŭra estonteco, neniu scipovis respondi. Ili konstatis, ke konsiderante rapide kreskantan ekonomian potencialon kaj influon de Ĉinio en la mondo, eble tiun rolon povos plenumi la ĉina. Ĉinio decidis apogi sian ekonomian kaj politikan influon en la modo ankaŭ pere de evoluo de lingva kaj kultura tereno. Dum la 1a monda ĉina konferenco en Pekino en 2005 ĝi aprobis strategian planon prezenti, disvastigi kaj evoluigi la ĉinan lingvon kaj kulturon en la mondo. Fine ili menciis, ke eble tiun rolo povus ludi Esperanto, kiu disvastiĝas helpe de civitanoj, tielnomata aliro de «sube» precipe pere de interreto.

*Nota:* Kiam Jianmin Li, reprezentanto de la Misio de Ĉinio ĉe EU v Bruselo, publike informis pri aprobo de la Strategia plano prezenti, disvastigi kaj evoluigi la ĉinan lingvon kaj kulturon en la mondo en 2005, verŝajne tre malmultaj inter la partoprenantoj sciis pri tio, ke temas pri historia paralelo, kiu okazis en 1961. En tiu jaro Usono kaj Britio subskribis dum la lingva konferenco en Kembriĝo, organizita de la Brita Konsilio, la sekretan interkonsenton pri strategia disvastigado de la angla kaj ĝia kulturo en la mondo, kiu estis la bazo por atingi la

*nunan superregadon de la angla kaj ĝia kulturo en la mondo! Informo en la libro "Ĉu nur angla Eŭropo?" de Prof. Robert Phillipson, 2003. Eble post 20 jaroj ni spertos efikojn de tiu strategia plano de Ĉinio.*



Al la konferenco estis invititaj interalie ankaŭ reprezentantoj de ĉiuj civitanaj organizoj de la Civitana Socia Platformo por Antaŭenigo de Multlingvismo, inter kiuj estis ankaŭ d-ro Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). Inter invititaj estis ankaŭ Jozef Reinvarť de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de Slovakio, kiu ankaŭ agas en la civitana platformo. Dum la konferenco ili kontaktis ĉiujn

panelistojn kaj multajn aliajn partoprenantojn kaj en diskutoj prezentis ideojn kaj rekomendojn de EEU, kiel ekzemple pioniran projekton por plibonigo de lingvoinstruado en elementaj lernejoj en Britio „Lingvolanĉilo“ kaj donacis al panelistoj raporton pri la projekto post ĝia 5-jara sukcesa lingvoinstruado. Jozef Reinvarť informis kaj disdonis DVD-on kaj aliajn informojn pri modela multlingva portalo de EU „Slovakie.eu“, preparita kaj kunordigata de la civitana asocio E@I, kiun financis Eŭropa Komisiono en 2009-2011, pere de kiu ekde ĝia lanĉo en la mondo jam preskaŭ 5000 studentoj en 170 landoj lernas rete tre sukcese la slovakon. Li informis interalie ankaŭ pri la fakto, ke tiu ĉi multlingva portalo estis preparita je 10-jara sukcesa sperto de multlingva reta portalo por lernado de Esperanto „Lernu.net“ en 36 lingvoj. Dank’al pluraj edukaj retaj projektoj kaj multaj bonaj ekzemploj de subteno al multlingvismo, inter kiuj estas Deutsch.info, Espa2.eu kaj aliaj projektoj de la civitana asocio E@I la Eŭropa Komisiono akceptis ĝin al la Civitana Socia Platformo por Antaŭenigo de Multlingvismo, kiel asociitan membron.

Kadre de la lasta diskutpanelo d-ro Seán Ó Riain rekomendis por plibonigo de lingvoinstruado prepari kaj efektivigi sciencan esploron en EU-membroŝtatoj pri temo, kiu unua fremda lingvo plej sukcese plibonigas lernadon de dua kaj pliaj fremdaj lingvoj, por pruvi ties propedeutikajn efikojn.

En diskutoj ambaŭ akcentis, ke el strategia politika vidpunkto kaj daŭrigo de eŭropa integriĝo, kohereco kaj la ekzisto de EU estas grave, ke EU listigu en siaj plej gravaj politikaj prioritatoj lingvajn kaj kulturajn temojn kaj problemojn, t. e. evoluon de kultura dimensio de la eŭropa integriĝo, kiu grave postrestas ekonomian kaj pacan dimensiojn, kaj tiamaniere transigi respondecojn de nacia al eŭropa nivelo. Ĝi estas unua grava kondiĉo ke landoj-membroj povos komenci integriĝi ankaŭ en kultura tereno kaj serĉi kune poreŭropajn, demokratiajn, efikajn solvojn akcepteblajn por ĉiuj membroŝtatoj kaj iliaj civitanoj.

Por plibonigo de formala kaj neformala lingvolernado estas bezonate uzi akiritajn informojn de Eurobarometro 2012 "Multlingvismo en Eŭropo". En pli granda skalo uzadi la plej novigajn alirojn kaj formojn pere de la plej bonaj praktikoj en efektivigataj projektoj, kiel ekzemple civitanaj rekomendoj prezentitaj en la raporto de la Civitana socia platformo por

antaŭenigo de multlingvismo prezentita al Eŭropa Komisiono en junio 2011, aŭ rekomendoj de aliaj profesiaj forumoj kaj institucioj por plibonigi rezultojn de studo de fremdaj lingvoj kaj plurlingvismon en EU, kiu kondukos al lernado, uzado kaj evoluo de ĉiuj lingvoj en EU.

Fine ni povas diri, ke reprezentantoj de EEU efektive utiligis la grandan lingvan konferencon en Limasol por prezenti novigajn ideojn de niaj civitanaj organizoj EEU kaj E@I por antaŭenigi vastan multlingvismon, lingvan kaj kulturen egalrajtecon en EU al kiu tre pozitive kaj sukcese kontribuas ankaŭ Esperanto prede modelaj projektoj de plej bonaj spertoj por plibonigo kaj rapidigo de lingvoinstruado. Eble ne estis tia granda surprizo, ke dum la lasta plenkunsida diskutpanelo de la konferenco estis menciita Esperanto, kiel ebla alternativo de estonta „lingua franca“ en la mondo. Esperanto iom post iom estas pere de agado kaj aktiva kontribuado de EEU prezentata en laboro kaj agado de la Civitana Socia Platformo por Antaŭenigo de Multlingvismo, kiu akiris en la Eŭropa Komisiono altan respekton kaj Esperanto jam ne estas konsiderata, kiel tabuo. Ni esperas, ke nia plua agado en la Civitana Platformo, kadre de ĝia nuna dujara etapo, helpos antaŭenigi kaj efektivitigi, kelkajn ideojn, kiujn ni rekomendis en la raporto de la Civitana Platformo en junio 2011. Ni esperas, ke ni sukcesos efektive evoluigi establitajn personajn kontaktojn kun politikistoj, funkciuloj de EU institucioj, reprezentantoj de naciaj ministerioj kaj neregistaraj organizoj por lanĉi tuteŭropan diskuton pri nova demokratia, justa kaj efika lingva kaj kultura politiko en EU kaj unuiĝanta Eŭropo.

Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

Jozef Reinart, kunlaboranto de la estraro de EEU

### **Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita: la 30 -an de oktobro 2012**

**Redaktoro: Zlatko Tišljár**

**En la numero kunlaboris:** Zlatko Tišljár, Brian Moon, Albert Wickler, Stanislav Rynduch, Peter Baláž, Seán Ó Riain, Lu Wunsch-Rolshoven, Frank Merla, Yu Jianchao, Jozef Reinart

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

